STARTO

N-ro 1/2024 (290)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

Marcipana Kristnasko en la muzeo

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto**: cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 1160 Kč, 700 Kč (rete), 400 Kč (rete por ĈEA-anoj); Marček: 1360 Kč, 900 Kč (rete), 600 Kč (rete por ĈEA-anoj), Cink por progresintoj 1920 Kč, 1000 Kč (rete), 700 Kč rete por ĈEA-anoj). Aliĝoj: kurzy@esperanto.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligon al la gazeta retejo, skribu al: muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:
2800 186 228/2010
Fio banka Svitavy

Výbor ČES:

Předseda: Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz**:** (koordinace a reprezentace ČES, muzeum Svitavy)

Místopředseda: Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

Pokladník: Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ČES)

Člen výboru: Leonarda Chaloupková, leonarda.chaloupkova@esperanto.cz (kluby a sekce, konference, granty)

Člen výboru: Mgr. Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (spolupráce s mládeží, web)

Redaktor Starta: Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika) fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:
Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201,
chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity
www.facebook.com/Esperanto.cz/
www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy
www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/
www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

Slovo předsedy

Vážení členové Svazu a čtenáři STARTA, vítám vás u prvního čísla našeho věstníku.

Výbor Českého esperantského svazu se schází online každý měsíc nad aktuálními problémy. Aneb, jak se lépe a mnohem méně negativisticky říká, nad výzvami k řešení. A těch výzev je opravdu hodně.

K těm nejpalčivějším patří stagnace či dokonce klesající počet našich členů. Počty nových členů nedokážou ani nahradit přirozený úbytek. Není to samozřejmě problém nebo výzva k řešení jenom esperantistů a jenom v České republice. Pevné členství v jakémkoliv spolku je mnohé lidi příliš závazné, a proto pečlivě přemýšlí, co jim takové členství přinese. Nové kontakty, nová poznání, účast na zajímavých akcích? A lze tyhle benefity získat i anonymně, aniž bych musel být někde evidovaným řádným členem?

Ptali jsme se v Prudké a měli bychom se ptát stále – co každému z nás esperantské hnutí dalo. A jsme schopni o tom přesvědčit své okolí? Často si stěžujeme, že není zájem. Ale není umění předat informaci někomu, kdo o ni sám požádá. Umění je vzbudit zájem a přesvědčit lidi okolo, že jde o správnou věc.

Mnohdy říkáme, že nejsou podmínky. Ale podmínky jsou vždy, jen vědět, jak je využít. Andreo Cseh si mohl před sto lety stěžovat, že nemá podmínky, že nejsou učebnice na kurs esperanta a že žáci mluví různými jazyky. Ale nestěžoval si a naopak přišel s novým konverzačním kursem, který postavil právě na podmínkách neexistence společného vyučovacího jazyka a výukových materiálů. Ĉe-metoda se nakonec ukázala jako velice úspěšná a velkou měrou přispěla k rozšíření jazyka. Neustále opakujeme, že lidi už nečtou a jenom koukají na obrázky a videa na internetu. Neklaďme si za cíl dostat lidi zpátky ke knihám. Je to sisyfovská práce s nejistým výsledkem. Přizpůsobme se a nabídněme jim naše informace v podobě, v jaké jsou zvyklí je přijímat. Řada klubů, a nejen u nás ale i v zahraničí, začala pořádat čas od času online setkání. Umožňuje to mít zajímavý program a zapojit přednášející i posluchače, kteří nejsou fyzicky přítomní. Příkladem hodným následování je třeba Klub esperantistů Brno. Ve spolupráci se Svazem jdou ještě dál a od dubna připravují i online kurz pro začátečníky.

A když je řeč o Brně – připravovaný Universala Kongreso v roce 2025 v tomto městě vytváří podmínky pro zvýšení informovanosti o našem hnutí v celé České republice. Nepromarněme tuto příležitost!

Mgr. Ing. Jiří Tomeček, předseda

Universala Esperanto-Asocio
en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando
☎ +31 10 436 10 44 +31 10 436 17 51 uea@co.uea.org

La 20-an de marto, 2024

Estimata Prezidanto de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio Jiří Tomeček,

Estas granda plezuro por mi konfirmi ke la Estraro de Universala Esperanto-Asocio sen kontraŭaj voĉoj akceptis ĉi-monate vian inviton okazigi la 110-an Universalan Kongreson de Esperanto en Brno, Ĉeĥa Respubliko, en la venonta jaro 2025.

Ni konscias ke vi komence intencis prepariĝi por 2026, sciante ke necesos konscienca laboro por ĉion bonorde plenumi. Tamen per la entuziasma distribuado de la *Malgranda gvidilo tra Brno* en la Torina UK, ni konstatis ke via preparado jam serioze komenciĝis, kaj ke vi havas kompetentan grupon en Brno el kiu formiĝos Loka Kongresa Komitato kiu profitos la subtenon de via Landa Asocio. Krome, ke la urbo mem havas elstarajn turismajn allogaĵojn, kiel oni povas konstati nur rigardante la 23 fotojn en la broŝuro! Kvankam aliaj grupoj interesiĝis, neniu pli kapablus realigi kvalitan UK en 2025 ol vi, loke kaj nacie.

Laŭ miaj propraj spertoj, kaj mi multe engaĝiĝis pri Montrealo ekde mia prezidantiĝo por konatiĝi kun la organizado de niaj Kongresoj, tute eblos por vi fari la necesajn aranĝojn ekde nun kaj dum la jaro post Tanzanio. La Kongresa Fako, nun kun kelkaj jaroj da sperto, povos doni al vi tre specifan gvidadon kun la prepar-datoj por evoluigo dum la jaro. Krome, pro ilia proksimeco kaj lingva kapablo por rilati kun lokanoj, vi havos grandajn avantaĝojn por tiu preparado kompare kun aliaj lokoj. Post UK en Torino kaj en Aruŝo, estas plej logike por UEA reveni al Eŭropo, kaj precize al via regiono por ke ni aparte atentu plifortigon de nia agado en via kaj en najbaraj landoj. "Jam temp' está" preskaŭ 30 jarojn post la 1996-a UK en Prago, kaj aparte pro tio ke via Landa Asocio havas internan forton kiu restas modelo por aliaj. Ni ankaŭ ne forgesu pri la signifo de elekto de la urbo kie fondiĝis la nuna ĈEA dum via konstitua kongreso de 1969.

Ĝoju pri tio ke vi havos la plenan subtenon de nia Estraro kaj de la membraro de UEA, ĉar via laboro estas konata, respektata, kaj niaj membroj konstatos la unikecon de via invito. Persone, mi multe antaŭĝuas esti kun vi, ĉar kvankam mi vizitis Pragon kaj Olomouc en antaŭa okazo por konferenco de lingvoinstruistoj, mi neniam havis la okazon akcepti la inviton konatiĝi ankaŭ kun la elstare historia kaj belega loko kiun vi proponas por la venontjara festado de nia lingvo.

Do kuraĝe kaj kune antaŭen, kaj kun niaj plej elkoraj dankoj pro via invito kaj fortostreĉoj dum la venonta jaro. Ni tute fidas ke vi kaj ni profitos de la elstara UK kiun vi plenkapable, ĝoje, kaj kreeme kunorganizos kun ni!

Plej sincere salutas kaj bondeziras

Duncan Charters, Prezidanto
Universala Esperanto-Asocio

Novaĵoj de KAVA-PECH

Malgraŭ tio, ke mi jam volis fini la Esperanto-fakon de mia eldonejo KAVA-PECH fine de ĉi tiu marto kaj transdoni ĝin al la eldonejo *Les éditions KAVA-PECH* de François Bolduc kun la sidejo en Montrealo, mi plu aktivas ankaŭ en ĝi. La kialo estas, ke François petis min daŭrigi, ĉar li ankoraŭ ne havas kondiĉojn por ĝia transpreno. Tamen mi jam celas pli fokusiĝi nur al la literatuto en la ĉeĥa, kompreneble inkluzive de tradukoj el Esperanto.

La unua ĉi-jara eldonaĵo de KAVA-PECH estas la plej baza verko de Nikolao Koperniko *Pri la rivoluoj de la ĉielaj korpoj / De revolutionibus orbium coeleftium*. Kiel montras la titolo, ĝi estas dulingva: la propra teksto verkita de Koperniko en la latina originalo kun traduko en Esperanton, kun abundaj klarigoj kaj notoj, kiuj estas nur en Esperanto. La tradukintoj kaj aŭtoroj de la aldonaj tekstoj estas profesoroj Hans Michael Maitzen el Vieno kaj Reinhard Fössmeier el Munkeno. Tio estas jam la tria rezulto de ilia kunlaboro, post *La gregoria kalendara reformo kaj ĝiaj postefikoj* kaj *Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado / Reise eines deutschen Professors ins Eldorado*. Ĉiuj ĉi aperis ĉe KAVA-PECH.





Plia libro, kiun mi volas prezenti, estas en la ĉeĥa, sed firme ligita al Esperanto. Temas pri la ĉeĥa traduko de la finalistaj noveloj de la dua interkultura Novelo-Konkurso (ankaŭ eldonita ĉe KAVA-PECH) *Poslední Cézarova cesta a jiná noční dobrodružství*. Ĝi enhavas 37 finalistajn rakontojn el 421 venintaj (bedaŭrine neniu el Ĉeĥio). La eldonon ebligis la tradukintoj Monika Kimáková (ĝis la paĝo 48 kaj Jindřich Košťálek (paĝoj 49 ĝis 172). Certe temas pri konvena donaco al niaj neesperantistaj amikoj.

Baldaŭ aperos *Golemo kaj aliaj judaj mitoj de la malnova Prago*, majstroverko de Eduard Petiška okaze de lia centjara jubileo. La verkon tradukis Vladimír Türk kaj ĝi aperos kun koloraj ilustraĵoj de Miroslava Tomečková.

En la jam antaŭpresa fazo estas ankaŭ *Esperanta-Ĉeĥa kaj Ĉeĥa-Esperanta Poŝvortaro* de Miroslav Malovec. Ĝi celas komencantajn esperantistojn, por kiuj ne necesas aĉeti grandajn kaj do multekostajn unuflankajn vortarojn.

Detalajn informojn, ankaŭ rilate al pli frue eldonitaj libroj de KAVA-PECH vi trovos ĉe https://kava-pech.cz.

Petr Chrdle, chrdle@kava-pech.cz

Mediteranea Esperanto-Semajno 2024

De la 9-a ĝis la 16-a de marto okazis en la bela hotelo Miléade en *Les Issambres,* en suda Francio, la jam bone konata Mediteranea Esperanto-Semajno (MES). Novan torĉon transprenis la Provenca Esperanto-Federacio. Organiza teamo konsistis el la entuziasmaj esperantistoj Thierry Spanjard, Renée Triolle, Marc Gallardo kaj Rosy Inaugi. La staĝon partoprenis okdek geesperantistoj el dek landoj. Post la alveno, sabate posttagmeze, nin akceptis la organizantoj kiuj disdonis al ni la necesajn materialojn. Renée tre bone majstris la aranĝon disdonante aktualajn informojn al la ĉeestantoj.

Ĉe la antaŭvespera kunveneto nin bonvenigis la hotelestro s-ro Jean-Luc Helias.

Okazis tri diversnivelaj Esperanto-kursoj. La komencantojn prizorgis Rodica Todor el Rumanio. Ŝi vigle mastris la kurson per varia instruprogramo kaj paroligis la lernantojn. Pri progresantoj okupiĝis Szilva Szabolcs (Sabi), hungaro loĝanta en Pollando. Li instruis laŭ sia metodo uzante komputilon. En la kurso por fluparolantoj Mireille Grosjean donis multajn utilajn informojn pri Afriko akompanatajn de bildoj, kio povis instigi iujn al partopreno en la ĉi-jara UK en Tanzanio.

Posttagmezoj estis liberaj, do la ĉeestantoj povis profiti promenojn en la ĉirkaŭaĵo, ludi kartojn aŭ elpensi aliajn ludojn kaj aktivaĵojn. Ankaŭ la hotelo proponis diversajn programerojn, en kiuj oni povis partopreni. Antaŭ la posttagmeza E-kurso, al la programo estis aldonitaj diversaj prelegetoj. Ni povis ekscii pri la unua inventisto de la fotografio, Nicéphore Niepce, naskiĝinta en *Chalon sur Saône* en la jaro 1765-a. Laŭ informo pri Ruando indiĝenoj perdas sian vivmanieron nome de natura konservado.

Merkrede posttagmeze estis planita vizito al la mondkonata parfumejo "Fragonard" en la urbo *Grasse.* Dum la gvidata vizito ni ricevis informojn pri la procedo produkti parfumojn kaj ni povis flari diversspecajn floresencojn.

La Mediteranea Esperanto-Semajno okazos ekde la 15-a ĝis la 22-a de marto 2025. *Liba Gabalda*

Grupo E-mental‘ en aŭstria Graz

Dek membroj de la klubo E-mental‘ forveturis la 15-an de marto 2024 per trajno el Prago al Graz en Aŭstrio, lando Stirio, por travivi semajnfinon kun lokaj esperantistoj. La evento estis planita jam kelke da monatoj kaj grazanoj dume diligente preparadis programon. Ĉar E-mentalanoj estis informitaj pri la planoj, ĉiuj tre ĝojatendis la kunvenon. Sed ĉiuj imagoj pri la renkontiĝo estis superitaj. La programo estis perfekte preparita de la komenco ĝis la fino kaj partoprenantoj vere povis ĝui ĉiujn programerojn.

Jam alveno en la ĉefstacidomo en Graz estis eminenta. Post komuna fotado sur perono estis E-mentalanoj portitaj per aŭtomobiloj al Esperanto-monumento kaj post plua fotado plue al loĝloko.

Post la loĝigo ĉiuj kunvenis en saloneto de nemalproksima restoracio por vespermanĝi kaj interkonatiĝi.

Sabate matene E-mentalanoj estis aŭte portitaj al klubejo, kiun grazanoj antaŭnelonge akiris dank‘ al urbestrino. Post la trarigardo de vere tre bela klubejo ĉiuj kune promenis ĝis la urbocentro, kie en surtegmenta kafejo estis mendita tablo. Post trarigardo de la urbo el la tegmento ĉiuj kafumis aŭ teumis, lokuloj parolis kun ĵurnalistoj. De la kafejo ni iris al Kastela monto super la urbo, kie ni vidis Horloĝan turon, kastelon, vizitis muzeon, ĝuis rigardon al la urbo kaj dum la tuta tempo ricevadis multe da interesaj informoj de la lokuloj…

Post reveno el la monto oni vizitis urban turisman informejon, kie oni povas dank‘ al lokaj esperantistoj ankaŭ trovi broŝuron pri la urbo en Esperanto.

Matene estis E-mentalanoj portitaj per aŭtomobiloj al proksima vilaĝo Thal, kie oni unue vizitis interese rekonstruitan preĝejon kaj poste domon, kie naskiĝis Arnold Schwarzenegger kaj kie nuntempe estas muzeo pri li. De la muzeo oni jam rapidis al restoracio por tagmanĝo, ĉar trajno de E-mentalanoj reen al Ĉeĥio veturis duonhoron post la tagmezo.

La tuta semajnfino estis vere bonega. Grazanoj sukcesis perfekte ĉion plani, ĉiam ili estis helpemaj, komune ili diskutis kaj pri seriozaj kaj pri malseriozaj temoj. Nekredebla estis ilia sukceso ricevi subvencion de la urba registaro kaj dank‘ al tio E-mentalanoj havis ekzemple senpagan tagmanĝon kaj vespermanĝon.

Vlasta Pištíková

ESPERANTO EN INTERRETO

konciza raporto de Pavla Dvořáková por la ĈEA-Konferenco en Prudká pri la ĈEA-retinformiloj kaj pri Esperanto en la ĉeĥaj retaj amaskomunikiloj inter oktobro 2022 kaj septembro 2023

En la **retejo Esperanto.cz** aperis ekde oktobro 2022 **12 ĉeĥlingvaj kaj 10 esperantlingvaj artikoloj**. Pozitiva novaĵo estas, ke ĉi-foje ili devenis pli ofte ankaŭ de aliaj aŭtoroj - krom Miroslav Malovec kaj Milan Kolka, de Vlasta Pištíková kaj Ladislav Hakl kaj ekde junio ankaŭ de Josef Kalčík, nova ĈEA-estrarano komisiita pri la retejo, kiu samtempe vigligis nian kunagadon kaj donis al ĝi novajn impulsojn. Valoras de li iniciatitaj ĉiumonataj redaktaj retkunvenoj. Dum la jaro estis iom post iom aktualigataj rubrikoj *Odkazy* kaj *Ligiloj*, kiujn vi estas bonvenaj vizitadi kaj uzi.

Novajn artikolojn mi diskonigis en la **paĝo Esperanto.cz ĉe Facebook**. Aperis ankaŭ fotaĵoj pri okazintaj aranĝoj, ligiloj al novaj videoj, elŝuteblaj libroj ktp. Sume mi publikigis dum la jaro **60 kontribuaĵojn**, kiuj estis plu partumataj en diversaj grupoj, inkluzive internaciaj. Tiel ankaŭ vigliĝis vizito de la ĈEA-retejo el eksterlando kaj realiĝis internacia interŝanĝo de informoj.
La paĝo nuntempe havas **458 ŝatantojn kaj 472 sekvantojn**, kiuj ricevadas avertojn pri novaĵoj. Se vi havas konton ĉe Facebook kaj ne ankoraŭ faris la subtenon, vi estas petataj fari tion, ĉar tio kreskigas reputacion de nia organizo.

Por la **FB-grupo Amikoj de Muzeo de Esperanto Svitavy** mi aperigis **25** aktualaĵojn rilatajn al historio kaj kulturo. Foje kontribuis ankaŭ la membroj mem, ekz. Boris Kolker aŭ Leopold Patek. La grupo nun havas **355 membrojn** el dekoj da landoj, en la lasta jaro al ĝi **aliĝis ĉ. 15 novaj** personoj.

FB- grupo Ĉeĥa E-Movado
havas **127 membrojn** kaj pozitive estas, ke la nombro iom post iom kreskas *(rim.: en marto 2024 jam 155)*. Dum la jaro petis membrecon ĉ. 18 homoj, inter kiuj nur 3 estis ĉeĥoj, do la grupo iĝas pli internacia. La membroj estas aparte petataj legi la novaĵojn kaj laŭeble fari ŝatsignon aŭ komentarion, ĉar tio subtenas senpagan aŭtomatan diskonigon.

La paĝo de nia Esperanto-muzeo en Facebook bedaŭrinde plu stagnas kaj atendas sian redaktoron. Interesitoj estas bonvenaj!

Por la **retejo Muzeum.esperanto.cz** mi publikigis lastjare plejparte nur invitilojn al aranĝoj aŭ ligilojn al klerigaj videoj kaj faris aktualigon de ligiloj. Mi koncentriĝis pli pri kolekto de taŭgaj materialoj por enhavo de la nove preparata retejo en WordPress. Mi esperas, ke danke al kunagado kun la ko-

legoj la nova retejo povos parte servi ankaŭ kiel reta interaga informpanelo el nia muzeo kaj pli alloge plenumi sian popularigan kaj klerigan funkcion.

La muzea paĝaro ĉe la socia retejo Ipernity, fondita en januaro 2011, havis **ĝis nun** entute **223 000 vizitojn**. Supozata jarstatistiko estas iom sub 10 000. Dum la lasta jaro pro pluraj kialoj kaj teknikaj komplikaĵoj en la retejo mi alŝutis neniujn novaĵojn, sed plu por vi senpage disponeblas **pli ol 2200 multmediaj dokumentoj en pli ol 50 albumoj.**
Fotoj kaj videoj spekteblas libere, sonaj kaj tekstaj dosieroj elŝuteblas post simpla senpaga registriĝo.
Por trovi la retejon sufiĉas skribi al via retserĉilo **ipernity muzeo.**

Aparte aprezinda estas aktiveco de **Esperanto-kluboj en Brno kaj Prago**, kiuj prizorgas proprajn **videokanalojn ĉe Youtube**. Esperantista klubo Brno publikigis entute **30 novajn registraĵojn** de siaj diverstemaj prelegoj. Esperanto Prago aperigis **14 novaĵojn**, krom prelegoj ankaŭ mallongajn specimenojn de poezio aŭ muziko. Vi ĉiuj estas invitataj sekvi por vi interesajn videojn kaj subteni ilin per ŝatoj kaj tiel motivigi la kreantojn por plua laboro. Aparta danko pro ĝi venas al Milan Kolka kaj Tomáš Břicháček.

Stato de informoj **pri Esperanto en la ĉeĥaj amaskomunikiloj** ne estas ĉi-jare tro ĝojiga. Aperis ekz. **artikolo** en la reta magazino *Seniortip.cz,* du **intervjuoj kun Petr Chrdle** (en la revuo *Knihkupec* kaj *iDnes*) kaj intervjuo **kun Pavel Polnický** en *Poděbradský zpravodaj*. **Invitilo al la muzea solenaĵo** aperis en la urba *retejo de Svitavy* kaj en formo de video en la kanalo de la regiona *televido CMS*. En la jutuba kanalo *Právě Teď!* spekteblas valora videoprelego de Petr Chrdle „Mezinárodní jazyk esperanto jako šiřitel kultury“. Krom tio plejparte nur mallongaj mencioj – la plej interesa estas de la framasona loĝio Dobrovský kaj intervjuo de Petr Dorůžka kun konata kantistino Karolina Cicha el Bjalistoko, kiu kantas i.a. en Esperanto.

Ĉiukaze lastjare aperis neniu informo okaze de Esperanto-Tago aŭ Zamenhof-Tago kaj por ni tio estas signo, ke ni kiel asocio devintus iom reaktiviĝi kaj ne plu lasi nian konfidon nur al la interesitaj redaktoroj neesperantistoj.

Vi ĉiuj estas invitataj:

- vizitadi la retejojn kaj komentarii la kontribuaĵojn
- diskonigi la informojn inter viaj geamikoj
- sendi fotaĵojn kaj informojn pri okazintaj aranĝoj, event. ankaŭ sendi viajn proponojn de la artikoloj en la ĈEA-retejo, kiujn ni volonte redakte finprilaboros.

KONTAKTO:
redakce@esperanto.cz

Vizito el Aŭstrio

Sabate la 9-an de decembro 2023 vizitis nin esperantistoj el la aŭstra Graz, ĉefurbo de la federacia respubliko Stirio, kaploke kun Richard Hable. Richard estas ankaŭ sekretario de la Aŭstria Esperanto-Federacio. Esperanto-kluboj en Graz ekzistas jam ekde la jaro 1906. Iliaj historio kaj aktivado estas koncize priskribitaj en la gazeto „voko el stirio“ (Bulteno de la Esperanto-movado en Stirio kaj de la Esperanto-Societo „Unueco“ Graz – Decembro 2023). Graz povas fieri per placo „Esperanto“ ĉe tramhaltejo survoje de la fervoja stacidomo al la urbocentro kun granda Esperanto-monumento, solene inaŭgurita okaze de 100-jariĝo de Esperanto en la jaro 1987. La klubo jam organizis plurajn kongresojn kaj konferencojn. Komune ni interŝanĝis spertojn en Esperanto-movado, rigardis la urbon el preĝeja turo sur la placo de Paco, vizitis la Ottendorfer-domon kun Esperanto-Muzeo, haltis ĉe Esperanto-arboj, rememoris universalajn kongresojn, en kiuj ni partoprenis. Ni travivis agrablan tagon kaj kredas, ke ni baldaŭ denove renkontiĝos.

Libuše Dvořáková

Marcipano kaj donacetoj en Esperanto-Muzeo

Jam la deksesan fojon okazis dimanĉe la 10-an de decembro 2023 en Esperanto-Muzeo la tradiciaj Marcipanaj Kristnaskoj sub gvidado de Anjo Vyšinková. Entute 85 infanoj estis kreantaj lumbrikojn, hundetojn, neĝulojn kaj elefantetojn. Ĉifoje la figuretoj estis pli grandaj ol kutime. Tial ili estis kreitaj iom malpli multaj - ĉirkaŭ 180. La intereso estis sama kiel en la antaŭaj jaroj. Ankaŭ la sinjoro urbestro Šimek venis kun sia eta filo. Infanoj ricevis Memordiplomojn.

Dimanĉe la 17-an de decembro 2023 okazis samloke alia aranĝo por infanoj, kiuj povis por siaj gepatroj kaj geavoj krei kristnaskan bondeziran donaceton laŭ sia propra projekto. La kreadon gvidis sinjorinoj Eva Karbašová kaj Ema Dondová. Unu el la knabinetoj kreis eĉ 10 donacetojn por siaj proksimuloj. Sinjorino Ema Dondová ofertis sian novan libron „Rakontoj el la Svitavy-pejzaĝo“. La libro en versoj enhavas rakontojn, legendojn kaj fabelojn pri Svitavy kaj ĉirkaŭaĵo.

Dum tiu ĉi aranĝo estis establita fejsbuka retejo de nia klubo, kie ni publikigas niajn aktivaĵojn.

Libuše Dvořáková

Libroj por Afriko

Antaŭnelonge mi petis vin donaci E-librojn por afrikaj esperantistoj. Vi estis bonkoraj kaj Julio Calegari, kiu iniciatis la kolekton, forportis el Prago sufiĉe grandan sakon da libroj. La libroj jam sukcese atingis Afrikon kaj lokaj esperantistoj jam ĝojas pro ili. Unu el ili hodiaŭ skribis al Julio tion ĉi:



efektive mi ĝojas ricevi la unuan fojon biblion de la nova testamento en Esperanto-lingvo. dankon Julio 15:31

Do dankon al tiu, kiu donacis la Biblion, kaj certe ankaŭ al vi ĉiuj, kiuj kontribuis al la kolekto!

Vlasta Pištíková

PRI ESPERANTO EN URBA BIBLIOTEKO BENEŠOV

Fine de aŭtuno 2023 du aninoj de la E klubo Benešov aranĝis prelegon pri sia klubo kaj pri Esperanto.

La direktorino de la biblioteko, juna aktiva virino, helpis ĉe preparo de la prelego,ĉe teknikaj aferoj.

L. Chaloupková kaj V. Stará parolis (uzante lumbildojn) pri la E klubo, ĝia historio, pri japanaj vizitantinoj de la klubo, pri Esperanto kaj ĝia fondinto. Ili finis iom amuze pri E gramatiko, pri kreado de vortoj pere de prefiksoj kaj sufiksoj ktp. Ili prezentis eĉ mallongan dialogon, por ke la publiko aŭdu, kiel sonas la lingvo.

Bedaŭrinde venis ne tro da aŭskultantoj, sed tiuj, kiuj ĉeestis, taksis la prelegon interesa kaj sukcesa.

LChal

Internacia Esperanto-Arkivo

estis fondita la 25-an de januaro 2021 en la belga Winksele apud Loveno.

www.iespa.eu

Fine de 2023 la kolekto konsistis el

■ 8.083 plenaj revujaroj (de 988 titoloj) + (almenaŭ), 5.185 neplenaj revujaroj (de entute 1.493 revutitoloj). Miloj da duoblaj revunumeroj (ne ekzakte nombrite): minimume po unu (sed ofte pliaj) numero(j) el 5.622 revujaroj, aldone 1.042 bindaĵoj de po unu aŭ pluraj (duoblaj) revujaroj

■ 14.743 libroj kaj broŝuroj (en 2024 ni atingos la psikologian sojlon de 15.000 libroj) + 13.477 duoblaĵoj (de 5.672 malsamaj titoloj)

■ kelkdek bretmetroj nekatalogitaj de dokumentoj (jes ordigitaj laŭ dosieroj) + jam dokumentite 4.686 eroj en 237 dosieroj. Duoblaĵoj: 1.887 dokument-ekzempleroj (de 913 malsamaj dokumentoj). Ni dubas ĉu indas konservi tiajn duoblaĵojn

■ Objektoj: 5 filmoj deponitaj ĉe Cinematek (cinematek.be) + kelkaj m^3 da objektoj poste katalogotaj.

Al la kolekto kontribuis unuopuloj kaj grupoj el pluraj landoj, ankaŭ el Ĉeĥio. En la jarraporto 2023 oni skribas:

„Kun la loka muzeo en Svitavy (CZ), kie ni renkontiĝis kun Libuše Dvořáková kaj Marie Čumová, ni interŝanĝis kelkajn libroskatolojn. Ili donacis 435 novajn + 49 duoblajn revunumerojn (kompletigo de 74 revujaroj) kaj 112 novajn + 21 duoblajn librojn.“

Laŭ jarraporto de Marc Vanden Bempt

Literatura konkurso *„Mia viv-aventuro”*

La organizantoj de la konkurso estas Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki en Bjalistoko kaj Bjalistoka Esperanto-Societo.

La konkurso okazos en la Filio „Esperanto-Libraro” de Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki en Bjalistoko inter 20.02.2024 kaj 31.07.2024.

La konkurso estas por junuloj kaj plenkreskuloj (almenaŭ 15-jaraj).

La verko devas esti maksimume 3 paĝojn de tajpaĵo granda (3 paĝoj kun po 1800 karaktroj, inklude spacoj).

Al la verko devas esti alkroĉita aliĝilo – plenigita kaj subskribita de la aŭtoro kaj, kaze de neplenkreskuloj, de la gepatroj/leĝaj reprezentantoj – verkoj sen la aliĝilo ne estos taksataj.

La partoprenanto deklaras, ke la sendita verko estas verkita de li/ŝi mem laŭ ties propraj ideoj.

Sendu kiel teksto-dosieron en la formato .doc, .docx, aŭ .odt alkroĉita al retmesaĝo sendita al

f14kp@ksiaznicapodlaska.pl

(kun la skanita plenigita kaj subskribita aliĝ-formularo kaj la informa klaŭzo - aliĝilon petu ĉe tiu adreso).

La verkojn necesas sendi ĝis la 31-a de julio 2024 (okaze de poŝta sendaĵo validas la dato el la poŝta stampo).

La respondeculoj por realigi la konkurson estas:

Maria Niemyjska
Przemysław Wierzbowski.

La verko ne rajtas esti publikigita antaŭe aliloke.

Asocia komitato

renkontiĝas virtuale ĉiun monaton, sed la 6-an de januaro 2024 la komitatanoj kunvenis ĉeeste en la stacidomo Choceň kiel gastoj en la klubejo de la fervojista esperantista asocio, kiun reprezentis Ladislav Hakl.

La ĉefa temo estis konferenco de ĈEA en Česká Třebová (2024-09-27/29), kaj diskutataj estis ankaŭ opinioj de asociaj membroj, kiujn ili esprimis en Prudká (Ideokreado kaj AAA - Anketa Aktivity Akcí).

La komitato poste kunvenis ankaŭ rete la 8-an de februaro kaj 7-an de marto, preskaŭ ĉiutage interŝanĝas opiniojn retpoŝte.

La asocio preparas novan retejon por la muzeo, kie prov-versio estas ekzamenata.

Alia iniciato de la komitato estas reta kurso de Esperanto, la kurson gvidos Milan Kolka.

Josef Kalčík prezentis strategion laŭ t.n. merkatika funelo, per kiu hazarda preterpasanto fariĝu adepto kaj fine advokato de nia ideo. Unue necesas konsciiĝo kaj interesiĝo. Taŭgus disvastigi la asocian retejon pri aliaj lingvoj kaj kulturoj.

Por la asocia retejo estis preparita de M. Malovec supervido de okazaĵoj en Esperantujo en 2023 en la ĉeĥa lingvo - por vizitantoj de nia retejo, por ke ili vidu, ke Esperanto vivas kaj viglas (vidu Aktuality ĉe www.esperanto.cz).

La asocio aĉetos provizon de libroj de KAVA-PECH antaŭ translokigo de la eldonejo al Kanado.

La konferenco okazos 27.-29.9.2024 en la Teknika kaj Trafika Mezlernejo Gustav Habrman en Skalka en Česká Třebová. Planata estas ankaŭ ekspozicio de libroj el la Esperanto-kolekto en la urba muzeo. Por la jaro 2025 oni planas loki la asocian konferencon al Havířov kunlabore kun loka klubo. Por iu el sekvaj jaroj ni verŝajne akceptos proponon de germanaj esperantistoj aranĝi komunan kongreson.

Granda temo estis ebla UK 2025 en Brno, sed ĝis la kunveno ne venis decido de UEA.

Kiel vi povas legi en la komenco de tiu ĉi numero de Starto, nia invito por la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno 2025 estis akceptita, kio por ni signifas ne nur ĝojon kaj esperojn atentigi la publikon pri nia lingvo, sed ĉefe multe da laboro.

CENT JAROJ DE ESPERANTO EN PŘEROV

Merkredon la 7-an de decembro 2023 renkontiĝis esperantistoj de la E-klubo Přerov en loĝejo de la kluba sekretariino Květoslava Černá. Bedaŭrinde ne venis ĉiuj dudek invititaj membroj de la klubo, sed tiuj, kiuj ĉeestis, travivis tri horojn en la amikeca medio.

Okaze de la centjariĝo de Esperanto en Přerov indas iomete retrorigardi al la komencaj jaroj de la movada ekzisto de Esperanto en la urbo.

En la jaro 1912 en la urbo Přerov tiam okazis laŭvice la dua kongreso de la moraviaj kaj sileziaj esperantistoj, ankaŭ por kune omaĝi memoron kaj la 320-an datrevenon de la naskiĝo de Johano Amoso Komenio.

Dum la kongreso tiam aktivis ankaŭ ĉefinstruisto Josef Krumpholc, kiu pli poste kuniniciatis fondon de la klubo de la esperantistoj de Přerov sub la nomo "Societo de esperantistoj en Přerov".

Fondintaj anoj de E-Societo 1923 en Přerov estis: Adolf Malík, Štympl, Kabelík, Prof. Pittner, Klüger, Jordán, Chmelařová kaj Grauerová. Kiel prezidanto estis elektita Adolf Malík – instruisto en la kursoj de Esperanto.

Oficiale la societo estis registrita la 16-an de marto 1923, kiam tuj al ĝi membriĝis 45 homoj. Tiam la unuan fojon en Přerov estis kantita himno de la esperantistoj "La Espero".

En la jaro 1927 vizitis klubon konata instruisto de Esperanto Andreo Cseh el Bukureŝto.

Dum la dua mondmilito estis aktivadoj de la esperantistoj en la tuta lando malpermesitaj.

Post la milito estis renovigitaj aktivadoj de la klubo, kies klubanoj aktivas ĝis nun, kiam ili festas centjariĝon de Esperanto en ilia urbo. Pli multe pri la aktivadoj de la esperantistoj de Přerov oni povas trovi en la interretaj paĝoj: **http://prerov.esperanto.cz/**.

Ni esperas, ke la aktivadoj de la esperantistoj de la E-klubo en Přerov daŭrigos ankaŭ dum multaj pluaj jaroj.

Miloslav Šváček

Sun Mingxiao: La Esperantisto de la Jaro

La Ondo de Esperanto en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro.

Sun Mingxiao (Semio) estas 59-jara esperantisto el Ĉinio, kiu disvastigas la lingvon en universitataj rondoj. Antaŭ dek jaroj li iniciatis **Internacian Esperanto-Muzeon en la Universitato de Zaozhuang**, kiu rapide fariĝis la plej granda tiutipa institucio en Azio kaj unu el la plej grandaj en la mondo, **kun 26 mil ekspoziciaĵoj sur 680 kvadrataj metroj**. Dum pluraj jaroj Sun Mingxiao instruis Esperanton en la sama universitato, ekde 2018 kadre de la nova kvarjara bakalaŭra programo.
En 2023 li emeritiĝis en sia laboro, sed daŭre aktivas por Esperanto. Lia Esperanta nomo **Semio** havas iom similan prononcon kiel lia ĉina nomo kaj signifas, ke li semas senĉese.

Li sukcesis konvinki la ĉefestrojn de la universitato subteni nian lingvon kaj konstruadon de la muzeo. **La celoj de la muzeo estas:** unue, protekti la kulturon de nia lingvo; due, propagandi Esperanton al la socio; trie, esplori la historion de la Esperanto-movado.

Oni jam havas planon transloki la muzeon de la malnova kampuso de la universitato **al la nova kampuso** proksima al trajna stacidomo, la nova muzeo okupos kvin mil kvadratajn metrojn. Kaj oni jam eklaboras por **ciferecigi la librojn kaj gazetojn** por cifereca muzeo. Por la reta epoko tiu laboro estas necesa kaj ege bezonata.

Ĉinio estas granda lando kun granda forteco de la Esperanto-movado. En Pekino estas Ĉina Esperanto-Ligo, *El Popola Ĉinio* kaj Ĉina Radio Internacia, en Zaozhuang estas la Esperanto-Muzeo, Esperanto-fako kun bakalaŭraj studoj, Arbara Parko de Esperanto kaj Zamenhof-busto en la kultura placo en la urbocentro, multaj asocioj viglas post pandemio. La granda defio estas la maljuniĝo de esperantistoj. Junuloj klopodas por pli bonaj laboro kaj vivo, junaj esperantistoj ne estas multaj, nia grava tasko estas **esperantistigi junulojn**.

Oni lanĉis la Esperanto-fakon kun kvarjara studado por trejni profesiajn esperantistojn; kompreneble la defio estas, ke mankas al ili la postenoj en Esperanto, necesas doni al ili la eblon labori. En la ceremonio de la 10-jara jubileo de la muzeo fondiĝis **Esperanto-Instituto, Centro de Instruado-Esplorado de Esperanto, Centro de Historio de Esperanto** kaj **Azia Biblioteko de UEA** en la universitato. La celo de la fondo de la institucio estas trovi postenojn por la diplomitoj de la Esperanto-fako.

Oni planas alvoki kelkajn altlernejojn por kunfondi Esperanto-Asocion (instituton) en la provinco, okazigi ekspoziciojn pri Esperanto en universitatoj en najbaraj urboj por propagandi nian lingvon. Konvinki neesperantistojn ĉiam estas malfacila laboro, **estas pli bone altigi la valoron de nia lingvo ol simple propagandi ĝin.**

Laŭ Paweł Fischer-Kotowski
La Ondo de Esperanto 4/2023

LA LIBRO DE LA MIL KAJ UNU NOKTOJ

(3 volumoj). Surbaze de la franclingva “Les mille et une nuit”, trad. el la araba de Antoine Galland (en 1704), esperantigis Daniel Moirand (Parizo, Espéranto-France, 2024). ISBN 9782957896158. Serio Oriento-Okcidento n-ro 63.



Daniel Moirand faris la tradukon en Esperanton el la libro *Les mille et une nuits: contes arabes*, kiun antaŭ 320 jaroj Antoine Galland preparis en la franca kaj publikigis, en 1704.

La traduko de Daniel Moirand estis kontrolita de Rob Moerbeek (Nederlando) kaj de Romano Bolognesi (Italio). La teksto estos ilustrita de multaj desegnaĵoj, kiuj venas de la eldono publikigita de Hachette (Parizo) en 1865. Ilin desegnis Gustave Doré, Castelli, Foulquier, Gustave Roŭ, F. Pierdon, ktp.

VERSAĴOJ EN PROZO

de **Ivan Turgenev** estas libro preparita de la eldonejo Sezonoj en elektronika formo, kaj elŝutebla en ilia retejo same kiel la revuo La Ondo de Esperanto (por abonantoj).



https://esperanto-ondo.ru/Aktualaj/Ondoteko.php

ALVOKO POR LA 46-A ESPERANTOLOGIA KONFERENCO DE CED

La organizantoj alvokas ĉiujn fakulojn, esploristojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la 46-a Esperantologia Konferenco (EK), sub la aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). La aranĝo estas planita por esti hibrida, laŭeble ebligante partoprenon rete kaj ĉeeste, kadre de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Aruŝo, Tanzanio (3-a ĝis 10-a de augusto 2024).

La proponoj, enhavantaj inter 150 kaj 200 vortojn, devas esti sendataj al la retadreso ek46@interlingvistiko.net. ĝis la 30-a de aprilo 2024.

Bitlibroj de UEA

estas senpage elŝuteblaj ĉe

https://uea.org/teko/libroj

LINGVO, HOMO KAJ MEDIO POR PLI BONA MONDO

estas temo de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta en Aruŝo, Tanzanio, inter la 3-a kaj la 10-a de aŭgusto 2024.

Tiu temo ebligos al kongresanoj diskuti pri la signifo kaj apliko de la tri agadkolonoj de UN, nome paco, homaj rajtoj kaj evoluigo.

KUNVENO DE VIKIPEDIISTOJ EN PRAGO HONORE AL MIROSLAV MALOVEC

La 9-an de decembro 2023 en la Skolta Instituto en Prago rande de la Malnovurba Placo okazis memor-kunveno pri naskiĝo de ĉeĥa Vikipedio (lanĉita 3.5.2002) kaj omaĝe al ĝia la fondinto, honora membro de ĈEA Miroslav Malovec.

La evento estis organizita kaj finance subtenita de la organizaĵo Fondumo Vikimedio ĈR. Krom vikipediistoj, atestantoj kaj reprezentantoj de la ĉeĥa Vikimedio la aranĝon ĉeestis ankaŭ esperantistoj, aktivaj en la projekto Vikipedio kaj aliaj rilataj al ĝi.

Post la komenca bonvenigo de la plenuma direktoro de Vikimedio ĈR Klára Joklová, usonano loĝanta en Berlino, Chuck Smith, parolis pri la kreado de Vikipedio kiel tia kaj precipe de la Esperanta, kies fondinto li estas. Liajn vortojn tradukis en la ĉeĥan la organizanto de la renkontiĝo Marek Blahuš (inter vikipediistoj konata sub la kromnomo Blahma). En sia kontribuo Chuck Smith ankaŭ informis la ĉeestant-ojn pri Duolingo (senpaga platformo por lernado de lingvoj, kiu proponas ankaŭ Esperanton) kaj pri sia nova projekto, pri kiu li nuntempe laboras.

demaldekstre Chuck Smith, Marek Blahuš kaj Miroslav Malovec

Poste Marek Blahuš resumis la biografion kaj agadojn kaj meritojn de Miroslav Malovec (pli pri ili en ĉi tiu artikolo en Esperanto.cz) kaj prezentis sian ĵus printitan *eldonaĵon* Kiel naskiĝis la ĉeĥa Vikipedio ("Jak se zrodila česká Wikipedie"). Krome la libro estas senpage elŝutebla (post klako al la supra ligilo kaj tie supre al Download).

Sekvis diskutado, tosto, prezentado de donacoj kaj komuna fotado. La renkonto pasis en agrabla etoso de nuptiĝo inter Esperanto kaj Vikipedio. Ni deziru, ke tiu rilato plu floru kaj ke ankaŭ ni esperantistoj al tio kontribuu, ĉu kiel redaktoroj, ĉu kiel pli oftaj uzantoj.

Laŭ, blog.wimimedia.cz resumis *Pavla Dvořáková, fotis Jan Beránek, CC BY-SA 4.0*

DU RIMARKINDAJ EKSPOZICIOJ EN PÍSEK

RAKONTO DE LA LUMO

Václav Lamr (1943-2020)

Sub tiu titolo okazis inter 28.11.2023 kaj 14.1.2024 en Malgranda galerio de la ekspozicia kulturcentro Sladovna (Maltejo) impresa prezento el la pentra kaj grafika verkaro de la ĉeĥa artisto, poeto, verkanto de aforismoj kaj elstarulo de evengeliisma movado. Mi vizitis la ekspozicion la lastan tagon antaŭ malinstalado kaj renkontiĝis tie kun lia al mi jam konata edzino Marie, kiu dum sekva kafumado malkovris al mi nekonatajn detalojn pri lia vivo.

Václav Lamr naskiĝis 25.4.1943 en moravia urbo Litovel en medio de familio kun longa tradicio de ceramik-, kaj precipe kahelfarado, en kiu renkontiĝadis intelekte kaj kulture inspiraj gastoj. Ankaŭ lia samaĝa kuzo Aleš kun siaj tri filoj elektis artan profesion.

Origine pro politikaj kialoj li ne estis akceptita al studado kaj devis lerni masonistan metion. Nur poste li povis studi farb- kaj pentroteknikojn en Artmetia mezlernejo en Brno. Sekve li laboris kiel stukisto, teatra artisto, sed ankaŭ kiel flegisto kaj artterapiisto en la monaĥejo Želiv kaj en Habrovany. En la sesdekaj jaroj, i.a. post resaniĝo el grava malsano, li kristaniĝis kaj sian vivon dediĉis ankaŭ al misia laboro kaj diskonigo de la evangelia mesaĝo kaj Dia amo per netradiciaj manieroj.

Li prezentis siajn verkojn en diversaj lokoj de Ĉeĥio kaj Slovakio (i.a. en 2017 ankaŭ en Urba Muzeo kaj Galerio Svitavy) kaj dum kolektivaj ekspozicioj en Germanio, Britio, Francio, Norvegio, Usono k.a. Nemalmultaj liaj bildoj troviĝas en privataj kolektoj tutmonde.



Li ofte prezentas konatajn bibliajn rakontojn kun ĝenerala etika mesaĝo kaj simbolajn motivojn, i.a. kun akcento al repaciĝo kaj toleremo inter kristanismo kaj judismo. Liaj kompreneblaj verkoj kapablas tuŝi kaj inspiri malfermajn homojn sendepende de ilia mondkoncepto.



Kun Esperanto li konatiĝis komence de la 1990-aj jaroj dank' al Pavel Kleissner el la ĉeĥa KELI-sekcio de ĈEA. Li lernis la lingvon plejparte aŭtodidakte kaj korespondis kaj renkontiĝadis kun esperantistoj ne nur el kristana medio. Li revizitadis klubojn en Prago kaj Písek, partoprenis i.a. UKojn en Prago, Roterdamo kaj Nitra, kie li ankaŭ ekspoziciis siajn bildojn – same kiel dum la ĈEA-Kongreso en Pelhřimov (2016).

Václav Lamr kaj lia verkaro sendube meritas esti de ni esperantistoj neforgesita. Pliajn informojn kaj fotojn eblas ĉehlingve trovi en la retejoj lamr.estranky.cz kaj vaclavlamr.com kaj en Muzeum.esperanto.cz.

GAZETO VEDEM KAJ PETR GINZ

La 4-an de januaro 2024 okazis en la Urba Biblioteko Písek solena inaŭguro de la ekspozicio **„Vedem – la vojaĝo de la knaboj de Terezín plu daŭras“**, kiu migras tra la tuta Ĉeĥio jam ekde 2012. Ĝi prezentas imprese la vivon en la geto de Terezín dum la 2-a mondmilito tra la okuloj de la tiamaj knaboj, sed akaŭ de iliaj nuntempaj samaĝuloj.

Unu el admirindaj aktivecoj en malfacilaj kondiĉoj de la vivo en la geto estis literatura gazeto Vedem, kiun inter 1942 kaj 1944 sekrete verkis, ilustris, kopiis kaj ĉiu-vendrede vespere komune kaŝ-legis en la ĉambroj de la „Hejmo 1“ 14-16jaraj knaboj.

En la gazeto aperadis priskribo de la realaĵoj, rakontoj, poemoj, ŝercoj, enigmoj, ludoj k.a. Ĝia ĉefredaktoro estis plurtalenta Petr Ginz (nask. en 1928), denaska esperantisto, kiu kiel 16jara mortis en la gaskamero de Aŭŝvico. Entute el la cento de knaboj, kiuj al la gazeto kontribuis, la koncentrejojn transvivis nur 15.

En 2009 ilia vivsorto kaptis la atenton de la gestudentoj de la privata gimnazio Natura Lernejo en Prago, kiuj decidis pli ekkoni iliajn vivojn kaj verkadon kaj disvastigi ilian mesaĝon. Kadre de la longdaŭra projekto „Stafeto de Terezín“ ili ekz. ne nur skanis la originalojn de tiu ĉi atentinda gazeto, sed ciferecigis ilin kaj faris la elekton de interesaĵoj por la retpaĝaro vedem-terezin.cz.

En 2016 la retejon esperantigis Miroslav Malovec kaj vi povas trarigardi kaj legi ĝin sub tiu ĉi ligilo. Por travivaĵmigrado tra Terezín ili pretigis aron da specialaj edukaj ludmaterialoj (ĉehlingve ĉi-tie).

Krome la gimnazianoj kunkreis la menciitan altkvalitan migran ekspozicion de la Memorejo Terezín, en kiu i.a. arte kunlaboris ankaŭ la fratino de Petr Ginz Chava Pressburger (aŭtorino de „Taglibro de mia frato“, en Esperanto-traduko de la geedzoj Novobilský eldonita de KAVA-PECH en 2005).

La migradon de la ekspozicio subtenis Fondaĵo por la viktimoj de holokaŭsto.

La inaŭgurojn de la ekspozio akompanadas ankaŭ kortuŝa kultura programo, konsistanta ankaŭ el literaturaj specimenoj kaj muzikigitaj poemoj de la knaboj. Tiujn ni povis ĝui ankaŭ nun en Písek en prezento de la okmembra studenta kaj instruista grupeto de la Natura lernejo.

Malgraŭ la tristaj militaj realaĵoj la projekto celas inspiri kaj instigi nin ĉiujn, kiel en malfacilaj kaj ŝajne eĉ senesperaj vivkondiĉoj tamen eblas ne perdi ne nur la esperon (ĉar ĝi ofte pasivas), sed ankaŭ bonkorecon kaj bonhumoron, senton de interna libereco kaj digneco, kuraĝon kaj kreemon.

Dum la inaŭguro mi povis post multjara paŭzo renkontiĝi kun la direktoro de la gimnazio Natura lernejo František Tichý, kiu grave meritas en la tuta projekto. En 2014 li eldonis sian biografian romanon pri Petr Ginz „Princ se žlutou hvězdou“ (*Princo kun flava stelo*), kiu sekve akiris prestiĝan premion „La ora rubando“. Mi mencias lin aparte ankaŭ pro tio, ke li principe dekomence simpatiis kun Esperanto kaj ĝia ideo kaj dank' al tio liainiciate en la unua lernojaro en 1993/1994 mi eĉ instruis regule Esperanton kiel devigan studobjekton 2 horojn ĉiusemajne al ĉiuj tiamaj gestudentoj de la gimnazio. La projekto bedaŭrinde ne povis plu daŭri pro nasko kaj zorgo pri mia filino, sed kiel konfirmiĝis dum la sekvataga komuna tagmanĝo, la rememoroj kaj reciprokaj simpatioj restis. Spaco kaj potencialo por plua eventula kunlaboro iukampa ĉi-tie principe malfermitas.

Aldonendas, ke en la antaŭhalo samtempe estis instalita ekspozicio de la nigrablankaj pentraĵoj de Stanislav Setinský, kiu ilustris i.a. 3 librojn de František Tichý (inkluzive tiun pri Petr Ginz) kiuj trafe emocie esprimis la supozeblan etoson de la vivo en la geto.



Etan elekton de la fotaĵoj proksimigantaj ambaŭ ekspoziciojn mi kreis por vi en la

Fotogalerio de Muzeum.esperanto.cz.

Mi volas esprimi mian dankon al František Tichý kaj lia teamo pro ilia admirinda engaĝiĝo en tiu ĉi postulhava sencohava projekto.

Kaj samtempe inviti vin eklegi

vedem-terezin.cz

aŭ ekskursi tra Terezín mem akompane de la kreita ludo. Per neforgeso ni tenas la kuraĝajn knabojn plu vivaj.

Pavla Dvořáková

Fragmento el la gazeto:

SENPEDIKIGA STACIO

Foje, kiam mi havis nenian laboron, mi entreprenis kun mia akompananto promenon tra Terezín. Sen certa celo ni travadis koton de la terezina periferio, kiam niajn okulojn frapis malfermita pordego: La senpedikiga stacio. Instigitaj de scivolemo ni eniris internen. Nian atenton katenis kelkaj laboristoj, kiuj estis transportantaj pedikplenajn matracojn en gaskameron. La gaso estas enpelata per specialaj aperturoj en la pordoj. La ceteraj fendoj estas zorge ŝtopitaj, por ke la gaso ne eskapu.

-nz (Petr Ginz)

Jan Fidel Řepa - 80

La dekkvaran de majo festos sian okdekan naskiĝtagon mia longjara amiko kaj instruinto de esperanto Jan Fidel Řepa. Ĉar same kiel mi li loĝas en Netolice, mi vizitis lin kaj iom priparolis la vivon entute, virinojn, teatron kaj esperantan vivon.

La domon, kie li loĝas, posedas lia familio jam ekde la jaro 1771, kiam lia prapatro rekonstruis drapofarejon je muelo.

Fidelon certe ne necesas prezenti, li konatas jam longjare kiel esperantisto, trampvaganto, amatora teatra aktoro kaj vivoĝuanto. Inter 1999-2002 li estis asocia komitatano kaj inter 2011-2016 li prezidis asocian kontrolgrupon. Malgraŭ la okdeko, malgraŭ sanproblemoj, li vere ĝuas la vivon.

"Unue mi komencis lerni la anglan, esperanton mi ekstudis nur jaron poste, en la j. 1955. Kaj mia panjo metis al mi la kondiĉon, ke mi samtempe devas plu ludi pianon, kiun mi lernis ekde la dua lerneja jaro. Mi partoprenis eĉ kelkajn konkursojn, sed ludi mi ne ŝatis. Malgraŭ tio mi "devis" ludi eĉ dum mia militservo.

Same mi ne konsideras min kantisto, ne havas muzikan aŭdkapablon kaj kantas "nur sin defendante", tamen mi iam-tiam kantis kun la amatora teatrogrupo Tyl en Netolice.

En Netolice estiĝis E-rondeto en la j. 1955. Fondis ĝin s-anoj Štěpánek kaj Hřebeček. Sur biciklo en ajna vetero alveturadis el České Budějovice Fr. Nymburský. Mia esperanta vivo fakte komenciĝis en la jaro 1957, kiam mi partoprenis instruan tendaron ĉe Popelná. Konserviĝis unu foto de matena oficiala komenco de tago, kun hisita flago. Organizis ĝin s-ano Křivánek el Písek kaj Vlastimil Novobilský. Unu el tiamaj instruistoj estis Jan Slivka el Poprad. Instrui esperanton estis tiam vere kuraĝe, en Sovetio ĝi estis denove permesita nur en la j.1979.

Mi esperantistiĝis fakte pro bildkartoj kaj poŝtmarkoj, kiujn mi admiris. Sed vere serioze mi lernis en la sepdekaj jaroj, vizitante kurson de Oskar Hrubý, kaj poste en Lančov. Inter aliaj instruis min s-ro Vondroušek kaj ĉefe Mirek Malovec, kiu laŭ mi regas Esperanton plej bone.

En České Budějovice post s-ano Hrubý gvidis la klubon S. Papírník, kiu ĉiam kapablis havigi monon por eldonadi kluban informilon aŭ aranĝi kunvenojn.

Iuj konsideras lin malfavore, sed certe iuj havas malbonan opinion pri mi, tio apartenas ja al la vivo.

En la j. 1979 mi komencis instrui esperanton al infanoj en Domo de pioniroj kaj gejunularo en Netolice. Krome mi sukcesis komenci ankaŭ en Prachatice, sed tie tiama distrikta estraro de Partio decidis, ke mi ne rajtas kontakti infanojn. Tamen en Netolice mi sukcesis dum kelkaj jaroj, ĉar la estrino, sinjorino Hrbková, protektantis min per la forto de sia edzo, Partia altrangulo.

Miajn proprajn filojn mi pritraktis alimaniere, ĉar mi spertis, ke esperantistoj devigas siajn infanojn lerni, sed ofte sensukcese. Mi do montris al ili lernolibron kaj poste ŝlosis ĝin en ŝranko kaj eligis ĝin nur, se ili bone kondutis. Tial ili mem ekinteresiĝis pri ĝi kaj ambaŭ regas ĝin ĝis nun.

Esperanto donis al mi multon. Sen ĝi mi certe ne renkontus tiom da interesaj homoj."

Restas grava afero - teatro. Fidel estas longjara elstara ano de la amatora teatra grupo "Tyl" en Netolice, kiu ĉiujare prezentiĝas en la ĝardeno de la kastelo Kratochvíle. Kiel ĝia posedanto, sinjoro Petr Vok z Rožmberka, li kelkfoje bonvenigis partoprenantojn de E-aranĝoj, multfoje dum renkontiĝoj deklamis E-poemojn kaj dublis por mi kelkajn filmojn.

En la jaro 2013 li partoprenis UK-on en Rejkjaviko kun studenta teatro DOMA el la gimnazio en Svitavy, kiu prezentis tie la dramon de K. Čapek R.U.R., sed mi rememoras ankoraŭ plian E-teatraĵon, kiun ankaŭ mi partoprenis. En la j. 1986, dum la konferenco de Junulara sekcio de ĈEA, ni prezentis teatraĵon. En mia memoro ne konserviĝis io plia.

Kiu konas Fidelon, tiu scias, ke li senĉese cerbumas pri virinoj kaj aliaj interesaj aferoj. Per (seks)aktivado laŭ li eblas bonege ekspliki la diferencon inter "amatino" kaj "amantino", Jan Hus enkondukis en la ĉeĥan gramatikon "circullum rotundus" kaj "circullum virgula" (supersignojn), sed estis mortbruligita, ĉar li ne forigis la fonemon "ch", kaj multaj konas ankaŭ aliajn liajn ŝercojn.

En la jaro 1981 li instruis Esperanton al plenkreskuloj en la loka biblioteko, kie infektiĝis ankaŭ la subskribinto.

Do, mi deziras al vi, kara Fidel: restu ĉiam la sama, nun ja ne valoras jam ŝanĝiĝi, ĉu?

Vladimír Türk

JUBILEANTOJ DE JANUARO, FEBRUARO KAJ MARTO 2024

Michal Balík, Olomouc
Jarmila Čejková, Frýdek-Místek
Ing. Jiří Dudek, Kunštát na Moravě
Anna Grozmanová, Kopřivnice
Jaroslava Hamajdová, Zruč nad Sázavou
Petr Hillebrand, Jablonec Nad Nisou
Vlasta Chmelová, Lázně Bohdaneč
Ing. Jan Kovařík, Opava-Malé Hoštice
Jaroslava Lipčíková, Prostějov-Držovice
Milena Pancová, Teplice
Eliška Mikušová, Domažlice
Lubomír Musil, Nasavrky
Ing. Petr Novák, Řevnice
Ing. Jan Rabl, Ostrava-Fifejdy
Věra Rezlerová, Praha
František Sklenář, Třebíč
Pavel Srb, Dolní Dobrouč
Ludmila Tesařová, Ostrava-Poruba
Miloš Thér, Police nad Metují
Libuše Tichá, Praha
Dr. Philippe-Schweizer Benoit, Praha

Al la jubileantoj ni deziras sanon, feliĉon, almenaŭ malgrandan ĝojon ĉiutage!

Magda Grimová

La 12-an de februaro ĝisvivis sian 90-jariĝon en domo por senioroj en Opava Magdalena Grimová – Matušková. Ŝi estas la plej aĝa membro de tiea klubo, en kiu ŝi apartenis la tutan vivon al fidinda kolono en pormovada aktivado. Ŝi eniĝis en organizado de iamaj SET en Žimrovice, Esperantistaj Kulturaj Festivaloj en Opava, dediĉis sin al la infana grupeto de la klubo, ŝi partoprenis ankaŭ oftajn esperantistajn renkontiĝojn, nome la katolikajn. En lastaj jaroj la malsano ligas ŝin al lito. Multegan dankon por via multjara laboro, Magda! -vk-

MORTIS KARLA ERBOVÁ

(1933-2024)

Je la 19-a de marto 2024 mortis en Prago la ĉeĥa poetino kaj verkistino **Karla Erbová.** Ŝiaj poemoj estis tradukitaj en la germanan, polan, luzacio-soraban, francan, bulgaran, italan – kaj ESPERANTON… Danke al **Jaroslav Krolupper** troviĝas en Esperanto unu ŝia poezia volumeto…

De la jaro 1966 (tiam sub la nomo Karla Papežová) ĝis nun, ŝi verkis pli ol 30 poezio-volumojn kaj publikigis multajn tekstojn en diversaj literaturaj kompilaĵoj, almanakoj k.s.

Ŝi naskiĝis en Plzeň kaj estis fondpersono de la literatura grupo *JUNIO 63* en Plzeň. En 1995-1997 ŝi estis prezidantino de instituto *Asocio de la Nacia biblioteko de la Ĉeĥa respubliko*. Ŝi estis membro de la *Internacia PEN-klubo – la ĉeĥa centro,* de *Umělecká beseda,* de la *Centro de verkistoj en la okcident-bohemia regiono*.

Ŝi ricevis *Premion de la urbo Plzeň*, *Premion de Jan Zahradníček,* plurfoje *Premion de Bohumil Polan,* kunlaboris kun *Československý* (poste *Český*) *rozhlas, kun Svobodná Evropa* (tute nature, ke post la j. 1968 ŝi estis „malpermesita“...).

Pasintjare ŝi ricevis la honoran premion **Artis Bohemiae Amicis** pro disvastigado de la ĉeĥa kulturo en nia lando, kaj eksterlande.

Kiel mi nun bedaŭras, ke tiu evento iris ekster mi, do mi ne povis al ŝi gratuli…

„Mian kulpon“ mi eliminos almenaŭ interne, se mi reĝuos la verkojn, kiujn ŝi al mi donacis…

Denove legi – kaj rememori…

20.3.2024 de Margit Turková

NOVA FAMILIO

La Asocio Nova Familio estas bonfara organizo, kiu funkcias en la urbo Goma, Demokratia Respubliko Kongo. Ĝia celo estas prizorgi infanojn, kiuj perdis siajn gepatrojn pro la intercivitanaj militoj en la lando.

Ĝi estis fondita antaŭ jaroj, oficiale registrita sub la nomo Asocio Nova Familio en la jaro 2021, fare de lokaj aktivuloj de la Esperanto-movado. Organizinte kursojn de Esperanto por infanoj, ni rimarkis, ke multaj el la lernantoj estas georfoj, kiuj, pro la milito fuĝinte el la hejmaj vilaĝoj, nun loĝas en gastigantaj familioj de nia urbo. Do tio venigis al strebo krei bonfaran asocion por helpi ilin.

Ni plezuras raporti al vi, ke ĉi-studojare 2023-2024 ni disdonis dank' al helpantoj lernomaterialojn al kelkaj infanoj de la bazaj lernejoj, de la mezaj lernejoj, de la universitatoj el multaj infanoj, kiujn nombras nun nia ANF . Post disdonadoj de la lernomaterialoj al kelkaj prizorgataj georfoj, ni devas ekpagi la lernejajn kotizojn. Nuntempe, ĉar ni ankoraŭ ne sukcesis pagi la lernejajn kotizojn, ili estas forpelitaj, maltrafas kursojn kaj ekzamenojn. Ĉu ĉiu de vi helpus laŭ via ebleco?

Nia ANF ekluprenis domon kiu iĝis la orfejo nomita „Orfejo Klara Zamenhof", en kiu ni realigas ĉiujn aktivecojn niajn kiel instruado de Esperanto, infanoj venadas kaj ludas (mankas al ili pliaj ludiloj) ktp. Sed ni ne povas loĝigi infanojn tie pro manko da rimedo nutri ilin ĉiutage. Ni ŝatus ke ili manĝu ĉiun dimanĉon, kio postulas 35 $ kaj tiel niaj infanoj satiĝus ĉiun fojon. Ĉu vi monhelpus por ke niaj infanoj manĝu ĉiun dimanĉon? Ni antaŭvidas ke, se ili loĝus en la orfejo, nutri ilin ĉiutage multe kostus.

Ni lanĉis nian projekton pri kudrado! Nun ni havas nur tri kudromaŝinojn kaj pluraj geknaboj eklernis kudri. Jam ili iomete scipovas kudri ĉar ili estas kudrantaj robojn, jupojn kaj kulotojn, kiujn ni disdonadas al niaj prizorgataj georfoj, kiuj portadis tiajn truitajn. Bedaŭrinde tri kudromaŝinoj ne sufiĉas por ĉiuj. Ni do bezonas pliajn por efike instrui kudradon kaj kudri la necesajn vestaĵojn. Ĉu vi, via klubo, via amikaro ... povus financi unu? Unu kudromaŝino kostas 150 $.

Freŝajn novaĵojn pri ANF vi trovas je:
https://1url.cz/vuPK4
Tie vi ankaŭ trovas kiel monhelpi.
Grandan antaŭdankon pro via helpemo!.

Por ANF Augustin KAKOZWA
kaj Betti Mau

Kluba vivo

Svitavy: En nia muzeo okazas ankaŭ geografiaj prelegoj por la publiko.

Prostějov: La 23-an de decembro 2023 partoprenis kluban Silvestron 8 membroj kaj 3 gastoj el Šumperk:

La 1-an de januaro 2024 tri klubanoj ascendis al Kosíř:

La 1-an de februaro 2024 okazis jarkunveno, kiu elektis novan komitaton: prezidanto – Liška Jaroslav, bibliotekisto – Budínová Jiřina, kasisto - Kincl Jiří kaj revizoro de buĝetoj – Pokorný Martin.

Vítkovice:

Kristnasko kaj Nova jaro

Brno: La 28-an de februaro 2024 kluba jarkunveno interalie traktis kunlaboron kun Moravia Landa Biblioteko kaj preparon de novaj kursoj.

La 2-an de marto 2024 venis pragaj esperantistoj el la klubo E-mental' por viziti ekspozicion *Misteroj de la mondo* en la somerkasteleto Mitrovský. Ambaŭ kluboj poste ludis keglojn en du teamoj kaj finis la tagon en kafejo de Mendel-muzeo.

Esperantistoj de Svitavy bilancis

La 24-an de februaro okazis jarkunveno de Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy. La membrobazo denove kreskis, nova membrino fariĝis Dana Bělohlávková, kiu jam certan tempon kunlaboras ĉe la klubaj aranĝoj. Prezidantino Libuše Dvořáková konatigis la ĉeestantojn kun agado de la klubo en la pasinta jaro 2023. En ĝi ni okazigis 32 aranĝojn kaj eldonis pluajn propagandajn materialojn de la muzeo. Por tiu agado la klubo elspezis 32.483,- Kč, el tio la urbo kontribuis per subvencio de 10.000,- Kč. En tiu sumo ne estas enkalkulitaj kostoj de vojaĝistaj vesperoj, kiujn organizas klubano Jan Richtr kaj ĉiujn elspezojn li kovras ankaŭ el subvencio, kiu estas kondiĉita per utiligo de propraj investoj.

Planante la aranĝojn por la jaro 2024 la klubo pro ekonomiaj motivoj devis ellasi „Renkontiĝon en la muzeo“, kiu estas finance plej postulema kaj por kiu ne restis al la klubo financoj post rettrompa atako kontraŭ la kluba budĝeto. Pro ellaso de tiu aranĝo ni petas pardonon de niaj favorantoj. Malgraŭ tio la klubo organizos pli ol 30 aranĝojn por la publiko, precipe la plej ŝatatajn de infanoj – Marcipanan Paskon, Marcipanan Kristnaskon, Kreadon de gratuldonacetoj. Nemalgrandan sumon de planataj elspezoj konsumos la teknika ekipado de la muzeo.

Libuše Dvořáková

Mladá Boleslav: En Klementinka la 6-an de decembro 2023 estis malfermita pordo por Esperanto.



Kaj en marto kaj aprilo realiĝos teatraĵo de Stanislava Hošková en la urba biblioteko kaj vojaĝista prelego pri Islando de Jindřiška Drahhotová denove en Klementinka:

La Malnovtestamenta rakonto pri Jozefo la Egipta, prezentita el du vidpunktoj de du malsamaj virinoj – la edzino de Potifar kaj ŝia sklavino. Parta scenadaptado de la libro "La skandalo pro Jozefo" de Valdemar Vinař, originale verkita en Esperanto (ĈEA 1981) kaj ĉeĥigita de Renata Mauserová (ambaŭlingve reeld. KAVA-PECH en 2001 kaj 2002). En ambaŭ roloj prezentos sin Stanislava Hošková el Dobříš, lernantino kaj posteulino de Eva Seemannová.

Esperanto-Klubo Prostějov
okaze de sia 115-a datreveno
invitas vin al

EKSKURSO AL PLUMLOV
sabate la 15-an de junio 2024

Renkontiĝo je 8:10 antaŭ la trajna stacidomo en Prostějov
(pli postaj alvenontoj bv. kontakti la organizantojn)

fotis Jan Komárek *CC BY-SA 4.0*

PROGRAMO:

8:15 Urbopromeno, vizito de Esperantaj vidindaĵoj kaj de brandfarejo Ĉe la verda arbo

12:00 Tagmanĝa kolbasrostado en la naturo
13:00 Promeno ĉirkaŭ la valbaraĵo Plumlov kaj vizito de la kastelo
15:00 Reveno piede aŭ buse

Aliĝu kaj informiĝu ĉe
EK Prostějov
T.G.Masaryka 11,
796 01 Prostějov

esperanto.klubo.prostejov@seznam.cz,
telefonnumero: 732907033

Junularo - TEJO aktuale

■ **Retoso, la plej mojosa - reta - evento de TEJO, okazas inter la 26-a kaj la 29-a de Aprilo.** Restu atentaj kaj sekvu niajn sociajn kanalojn por pliaj detaloj, sed jam pretiĝu ĉar la evento promesas kiel kutime la plej malaĉan programon! Kaj se vi ne konsentas, kial ne proponi programeron: la evento certe pliboniĝos danke al via kontribuo!

■ Februaro estas grava monato, ĉar dum ĝi, ni celebras lingvojn! Okaze de la **Internacia Tago de la Gepatra Lingvo**, esperantistoj el la tuta mondo rakontis pri siaj plej ŝatataj vortoj aŭ proverboj en sia gepatra lingvo. **Spektu la videon en nia Jutub-kanalo!**

■ Post kelkaj semajnoj da alkutimiĝo, **Ikvero Almeida**, nova estrarano de TEJO, estis akceptita en la TEJO-teamo.

■ Parolante pri aldono en la TEJO-teamo, ni en februaro oficiale bonvenigis **LEJO-n (Litova Esperanta Junulara Organizo)** kiel landa sekcio de TEJO. Gratulon al ili! Aldona preteksto por festumi dum la Internacia Junulara Kongreso 2024 en Ŝventoji, ĉu ne?

■ **Jen novaj limdatoj por sendi tekstojn por la revuo** *Kontakto***:** 20-a de Majo (2024:2), 24-a de Junio (2024:3), 19-a de Aŭgusto (2024:4), 30-a de Septembro (2024:5) kaj 11-a de Novembro (2024:6). Sendu kontribuaĵojn al **kontakto@tejo.org!**

■ Februare ni lanĉis **foto-konkurson,** kies temo estis **"Esperantujo por ne-esperantisto".** La defio estis do priskribi Esperantujon al ne-esperantisto per unu bildo. Niaj 3 volontuloj, post zorgema konsidero, ĝojas prezenti al vi la jenan foton, kiu plej bone reprezentas la temon. La priskribo, kiu akompanis la bildon ankaŭ estas impona kaj bone priskribas Esperantujon laŭ ilia takso. **Kaj vi, kion vi opinias?**

■ La esperantista junularo de **Sud-orienta Azio** invitas vin partopreni en KUŜEJO, kiu okazos en Jogjakarto (Indonezio), de la 14-a de Novembro ĝis la 17-a de Novembro! La evento estas okazo renkonti novajn amikojn el ĉiuj kulturoj de Sudorientazio!

■ **"Salaton karotoj, kiokaz'?"** Antaŭ kelkaj semajnoj, ni demandis vin en Instagramo kiuj estas viaj plej ŝatataj slangaj vortoj aŭ esprimoj en Esperanto: tiuj novaj vortoj, esprimoj aŭ parolmanieroj, kiuj naskiĝas ene de grupoj, ne estas oficialaj kaj estas uzataj en ne formalaj kuntekstoj sed disvastiĝas kaj iĝas pli kaj pli komprenataj de la tuta komunumo. Ni tre ŝatis la respondojn kaj kundividos kelkajn el ili!

Knufli | **Mojosa** (ĉu vi sciis ke la vorto estas mallongigo de modern-jun-stila – MJS?) | **Krokodili** & **Gaviali** (sed fakte, ĉiuj idiotismoj rilate al reptilioj, ĉu ne?) | **Aŭĥvarda** | **Malaĉa** | **Boji** (por homoj!) | **Megero**... **Ŭaŭindaj** vortoj, ĉu ne?

■ **Skoltoj** planas tendumadon ĉi-somere en **Ĉeĥio**, sed ankoraŭ mankas detaloj.

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Andrey Švubové a.svubova@email.cz seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

06940 členství ČES
06941 členství UEA
06942 předplatné Starta bez členství
06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
06944 poplatek UK
06945 kongres EEU
50400 komise pedagogická ILEI
50401 písemný kurs začátečníci
50402 písemný kurs pokročilí
50404 Paroliga kurso
50405 svazové zkoušky
50800 sekce nevidomých LIBE
50900 sekce zdravotníků UMEA
51000 sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 123 - 830 734 0217/0100
Komerční banka Poděbrady
51100 sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
51200 sekce informatiky
70100 komise pro tisk a inf.
80200 ediční fond
80300 propagace v tisku
80400 fond Tilio
80500 virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335.** Předplatné uhraďte na účet u **Raiffeisenbank, č. ú. 101 953 9617/5500**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1400,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 850,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1450,- Kč (*970,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (**cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)*

La Ondo de Esperanto aperas dumaniere: (1) kiel ĉiutage ĝisdatigata novaĵretejo (https://sezonoj.ru/), kaj (2) kiel ĉiusezona almanako (kun literatura suplemento jarfine), kiu enhavas la plej gravajn tekstojn el la novaĵretejo kaj krome artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitajn speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto". La novaĵretejo ekzistas danke al la donacoj kaj abonoj al la almanako "La Ondo de Esperanto". Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanako estas legebla nur de tiuj, kiuj abonas ĝin.

Estas tri abonkategorioj:
1. Abonanto – 400 Kč
2. Amiko – 800 Kč
3. Patrono – 2600 Kč

Ĉi-jara UK okazos somere en Aruŝo, Tanzanio, unuafoje en Afriko.

Periodikum Českého esperantského svazu, z.s.
55. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:

p/a Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz

Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2024

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio 55-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,

Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva numero: 7.5.2024

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en Eventaservo.org
kaj Kalendaro de Esperanto.cz.

Ĉiun duan merkredon virtualaj kunvenoj de E-Klubo en Brno (Esperantobrno.cz). Gastoj bonvenas!

2024-03-23 Ĝuu EsperantoN 2 en Pardubice, e-mentalprago@seznam.cz
2024-04-13 Ĝuu EsperantoN 3 en Ostrava, e-mentalprago@seznam.cz
2024-04-19/21 La 19-a BIERo en Břeclav, e-mentalprago@seznam.cz
2024-05-15/19 Plurlingvula kunveno - Polyglot Gathering en Prago, info@polyglotgathering.com
2024-06-15 Ekskurso al Plumnov okaze de 115-a datreveno de EK Prostějov
Infor: **esperanto.klubo.prostejov@seznam.cz** telefon: 732907033
2024-06-16 Internacia Montara Renkonto sur Granda Ĉantorio, suchanekj@seznam.cz
2024-08-09/11 Renkonto de ekstendaranoj en Lančov, let.lancov@seznam.cz
2024-09-27/29 **ĈEA-konferenco** en Česká Třebová, komitato@esperanto.cz

Elekto de gravaj aranĝoj eksterlande

2024-05-08/12 75-a IFEF-Kongreso en Strasburgo, kongreso2024@gmail.com
2024-5-31/06-02 5-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo, kse.krakovo@gmail.com
2024-06-14/26 46-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno, org. Gliwice'a Filio de PEA, stanislav.mandrak@gmail.com
2024-07-18/21 41-a Pola Esperanto-Kongreso en Kalisz, kongreso@espranto.pl
2024-08-03/10 **109-a Universala Kongreso** en Aruŝo (Tanzanio), uk.esperanto.net/2024/
2024-08-03/10 73-a KELI-Kongreso en Vác (Hungario), agnes@raczkevy-eotvos.com

2024-09-20/22 Beneluksa Kongreso en Hasselt, limburg@esperanto.be

2024-08-24/31 90-a Itala Kongreso en Montecatini Terme, fei@esperanto.it

Klubanoj de EK Prostějov ĉe Velký Kosíř

Esperantistoj ĉe Wikimedia
la 9-an de decembro 2023

Vítkovice 2024-01-31 jubileo de Ludmila

Prelego pri Esperanto en Urba Biblioteko
Benešov

E-mental' en Brno la 2-an de marto 2024

Bestĝardeno 2024